

NE MALTRANKVILIĜU PRI LA MORGAŬA TAGO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 6, 24-34

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:

«Neniu povas servi du estrojn; ĉar, aŭ li malamos unu kaj amos la alian, aŭ li preferos unu kaj malestimos la alian. Tiel same vi ne povas servi Dion kaj la monon! Pro tio Mi diras al vi: Ne tro zorgu pri tio, kion vi manĝos aŭ trinkos - kio estas necesa por la vivo -, aŭ pri la vesto, kiun vi surmetos. Ĉu la vivo ne estas pli valora ol la nutraĵo, kaj la korpo ol la vesto?

Rigardu la birdojn, kiuj vivas en libereco: ili ne semas nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn, kaj via ĉiela Patro nutras ilin. Ĉu vi ne valoras multe pli ol ili? Kaj kiu el vi, per klopodoj, povas aldoni unu tagon al sia vivo?

Kaj kial vi tiom maltrankviliĝas pri vestaĵo? Rigardu kiel kreskas la floroj de la kampo: ili ne laboras nek ŝpinas. Tamen Mi diras al vi, ke eĉ Salomono en sia plena gloro ne estis ornamita tiel bele kiel ili. Nu, se Dio tiel vestas la herbaĵon, kiu hodiaŭ estas freŝa en la kampo, kaj morgaŭ estos ĵetata en la fajron, kiom pli Li zorgos pri vi? Malgrandfiduloj!

Ne maltrankviliĝu do dirante: “Kion ni manĝos?” aŭ: “Kion ni trinkos?” aŭ: “Kion ni surmetos?”. Ĉar pri ĉi tio idolanoj zorgas. Via Patro, kiu estas en la ĉielo, scias, ke vi bezonas tion.

Sed zorgu unue pri la regno de Dio kaj pri servo al Li, kaj ĉio estos krome donita al vi. Kaj ne maltrankviliĝu pri la morgaŭa tago, ĉar la morgaŭa tago jam havos siajn zorgojn. Por ĉiu tago sufiĉas ĝia propra malbono».

En tiu ĉi peco de la evangelio de Mateo Jesuo konfirmas tion, kio estis anoncata en la beatecoj. Tiu kiu prizorgas la bonon de la aliulo kaj la bonfarton de propra frato, permesos al Patro lin prizorgi. Pro tio la peco komenciĝas de ĉapitro 6, versiklo 24 de Mateo, per la averto de Jesuo "*vi ne povas servi Dion kaj la monon!*"

Por 'mono' li utiligas la aramean esprimon Mamono, kiu indikas la posedajon, la kapitalon, nome tion en kiu la homo fidas. Mamono devenas de radiko kiu estas la sama de la vorto Amen, nome tio kio veras, tio kio certas. Nu, la homo trovas sian certecon en la havaĵo kiun li amasigis.

Jesuo invitas meti sian certecon ne en tio kiun iu posedas kaj tenas por si mem, sed en tio kiun iu donas kaj kundividas kun la aliaj. Jesuo do invitas tiele elekti. Kaj, konfirmas Jesuo, se tiu elekto estas, tiam la Patro prizorgos siajn filojn. Fakte, diras Jesuo, "*ne maltrankviliĝu*", kaj tiu invito ne maltrankviliĝi estos ripetata eĉ tri fojojn, kaj, laŭ la literatura tekniko de la evangeliistoj, ĝi signifas ion kompletan, definitivan, certan.

Jesuo do invitas ne maltrankviliĝi pro la esencaj vivelementoj, kiel manĝi, trinki, sin vesti, kaj proponas ekzemplojn. Li diras: "*Rigardu la birdojn, kiuj vivas en libereco*". Kial li proponas ĝuste tiun ĉi ekzemplon de la birdoj vivantaj en libereco? Ĉar oni opiniis ilin kiel senutilajn kaj nocajn bestojn, bestojn pro kiuj la Sinjoro ne estis benata. Eĉ en la evangelio de Luko oni parolas pri korvoj, kiuj estis konsiderataj malpuraj bestoj. La plej senutilaj kaj sensignifaj elementoj de la kreado, do.

Nu, Jesuo diras: "*Rigardu la birdojn, kiuj vivas en libereco: ili ne semas nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn, kaj via ĉiela Patro nutras ilin*". Tiu de Jesuo ne estas invito al fatalismo en kiu oni atendas ke la providenco faru ĉion. Ne! Jesuo diras "Se Dio nutras la birdojn en libereco kiuj ne semas, nek rikoltas, nek kolektas, des pli vin, kiuj semas, rikoltas kaj kolektas. Ne temas do pri invito nenion fari, sed aktive sin engaĝi senzorge.

Kaj poste Jesuo proponas la ekzemplon ke neniu povas plilongigi propran vivon aŭ la veston kaj poste li diras: "*Rigardu kiel kreskas la floroj de la kampo*". La plej komunaj floroj, tiuj kies vivodaŭro estas nur unutaga.

Kaj Jesuo certigas ke "eĉ Salomono en sia plena gloro", tio estas lia vantemo – "ne estis ornamita tiel bele kiel ili". Tiam la instruo de Jesuo: "se Dio tiel vestas la herbaĵon, kiu hodiaŭ estas freŝa en la kampo, kaj morgaŭ estos ĵetata en la fajron, kiom pli Li zorgos pri vi?", kaj ĉi tie estas la riproĉo de Jesuo, "Malgrandfiduloj!"

Malgrandfido ne signifas ke oni kredas malmulte, sed mankon de fido. Jesuo do invitas al plena fido. Se vi engaĝas vin por la bono de la aliuloj, la Patro prizorgos vin, je kompleta avantaĝo de la homoj! Tiam Jesuo duan fojon diras: «Ne maltrankviliĝu do dirante: "Kion ni manĝos?" aŭ: "Kion ni trinkos?" aŭ: "Kion ni surmetos?"», kaj li faras tre fortan komparon.

"Ĉar pri ĉi tio idolanoj zorgas", tiuj kiuj ne kredas je la Patro. Se vi do maltrankviliĝas pro la vivo, pro tio kion vi posedas, ktp, vi estas kiel personoj kiuj ne konas la Patron. Kaj, certigas Jesuo: "Via Patro, kiu estas en la ĉielo, scias, ke vi bezonas tion". La certigo de Jesuo estas ke al la Patro oni ne devas peti ĉar la Patro antaŭas la petojn de la homoj, li konas la bezonojn de la homoj, la agado de la Patro do antaŭas ĉiam la peton de la filo.

Kaj jen la fina invito. "Sed zorgu..." tio estas klopodu, agadu, "..unue pri la regno de Dio", tio estas tiu nova komunumo alternativa al la socio, kie anstataŭ la posedo estu la kundivido, anstataŭ la ordono estu la servado, "lia justico". Kiel justico oni celas la fidelecon. Jesuo do invitas al fideleco al tio kio estis anoncata en la beatecoj por krei alternativan socion. "Kaj ĉiuj tiuj aferoj", do la manĝo, la trinko kaj la sinvesto, "estos donitaj al vi", ne en la kvanto kiun vi bezonas, sed "aldone". Dio ne lasas sin superi en malavareco kaj li donacas vivon al tiu kiu komunikas vivon al aliuloj.

Kaj jen la lasta invito ne maltrankviliĝi, por la tria fojo. "Ne maltrankviliĝu do pri la morgaŭa tago". Kaj ĉi tie malnova traduko naskis eĉ

maltrankvilon; la malnova traduko estis "ĉar la morgaŭo havos siajn maltrankvilojn", tio estas ne maltrankviliĝu pro la morgaŭo, ĉar jam estis tiom da problemoj hodiaŭ, kiu scias tiuj de morgaŭ. Nenio el tio. La traduko, kiu estis ĝuste farita en la lasta eldono estas: "*Kaj ne maltrankviliĝu pri la morgaŭa tago, ĉar la morgaŭa tago jam havos siajn zorgojn*".

Tio estas la plena fido, la plena sereneco. Kiel hodiaŭ vi spertis la providencan agadon de la Patro kiu prizorgis vin, ankaŭ morgaŭ tio okazos. Kaj konkludas Jesuo: "*Por ĉiu tago sufiĉas ĝia propra malbono*", tio estas la problemo, la spirmanko, la zorgo ne devas esti projekciataj en la estonton, sed ĉiun tagon la Sinjoro respondas al la bezonoj de siaj filoj.